

02 BLUA KRIZANTEMO

"Nun mi rakontos al vi," diris maljuna Fulinus, "kiel Klára venis en la mondon. Tiam mi estis establanta la princan lihtenbergan parkon en Lubenec - sinjoro, la maljuna princo, li estis ja eksperto; tutajn arbojn li sendigadis al si de Veitsch el Anglio, kaj nur da bulboj el Nederlando li aĉetis dek sep mil; sed tion nur tiel pretere. Do, foje dimanĉe mi iras tra strato en Lubenec kaj renkontas Klaran; sciu, ŝi estis tiea idioto, surdmuta frenezeta ulino, kiu iranta tra kie ajn feliĉege blekis - ĉu vi scias, sinjoro, kial tiuj idiotoj estas tiom feliĉegaj? Ĵus mi evitis ŝin, por ke ŝi ne donu kison al mi, kiam subite mi ekvidis, ke en la manaĉoj ŝi havas bukedon; ĝi estis aneto kaj la cetera kampa herbaĉo, sed inter ĝi, sinjoro - jam kelkion mi vidis, sed tiam povis min trafi apopleksio. Ŝi, la perpleksa, havis en sia bukedo unu floron de korimboporta krizantemo, kiu estis blua! Sinjoro, blua! Ĝi estis tiel blua kiel Flokso Laphami; iom ardeze nuancita, kun atlase ruĝa rando, interne kiel Kampanulo Turbinata, bele plena, sed ĉio estas ankoraŭ nenio: sinjoro, tiu koloro estis tiam kaj ankoraŭ nun ĉe staŭda hinda krizantemo estas nepre nekonata! Antaŭ jaroj mi estis ĉe olda Veitsch; siro James iel ege, kara sinjoro, fanfaronis, ke pasintjare floris ĉe ili unu krizantemo, importo rekte el Ĉinio iomete lile, sed vintre ĝi bedaŭrinde pereis al ili. Kaj ĉi tie la grakanta ĉifonulino havis en la manego krizantemon tiel bluan, kian vi povas nur deziri. Bone. Do tiu Klara ĝoje amuis kaj puŝas al mi tiun sian bukedon. Mi donis al ŝi kronon kaj montris je la krizantemo: Klára, kie vi ĉi tion prenis? Klára entuziasme klukis kaj ridaĉis; nenion plu mi eligis el ŝi. Mi krias je ŝi, mangestas, sed ĉio vana; neprege ŝi volis min brakumi. Mi kuras al la maljuna princo kun la valorega krizantemo: Ekscelenco, ĉi tio kreskas ie en la ĉirkaŭaĵo; iru serĉi tion. La maljuna igis tuj aljungi kaleŝon, kaj ke ni kunprenos Kláran. Sed Klára dume perdiĝis kaj ne estis trovebla.

02 MODRÁ CHRYZANTÉMA

“Tak já vám povím,” řekl starý Fulinus, “jak přišla Klára na svět. Tehdy jsem zařizoval knížecí lichtenberský park v Lubenci – pane, starý kníže, to byl nějaký znalec; celé stromy si nechal posílat od Veitsche z Anglie, a jen cibulí z Holandska odebral sedmnáct tisíc kusů; ale to jen tak vedle. Tak jednou v neděli jdu v Lubenci po ulici a potkám Kláru; víte, to byl tamní idiot, hluchoněmá bláznivá káča, která kudy šla, tudy blaženě hýkala, – nevíte, pane, proč jsou tihle idioti tak blažení? Zrovna jsem se jí vyhýbal, aby mně nedala hubičku, když najednou zahlédnu, že má v prackách kytici; byl to nějaký kopr a takový ten polní neřád, ale mezi tím, pane – já jsem viděl ledacos, ale tehdy mě mohl trefit šlak. Ona vám ta potrhlá měla ve své kytce jeden květ pompónové chryzantémy, která byla modrá! Pane, modrá! Byla to asi taková modrá jako Phlox Laphami; trochu břídlícově nadechnutá, s atlasově růžovým okrajem, uvnitř jako Campanula turbinata, krásně plná, ale to všechno ještě nic není: pane, ta barva byla tehdy a ještě dnes je u vytrvalé indické chryzantémy naprosto neznámá! Před lety jsem byl u starého Veitsche; sir James se mi nějak, panečku, chlubil, že jim loni kvetlo jedno chrysanthemum, import přímo z Číny, tak drobet lila, ale v zimě jim bohužel zašlo. A tady ta krákorající maškara měla v pařátu chrysanthemum tak modré, jak si jen můžete přát. Dobrá. Tak tedy ta Klára radostně zabučela a strká mně tu svou kytici. Dal jsem jí korunku a ukazoval jsem jí tu chryzantému: Kláro, kdes tohle vzala? Klára nadšeně kdákala a řehtala se; víc jsem z ní nedostal. Křičím na ni, ukazují rukama, ale nic platno; mermomocí mě chtěla obejmout. Běžím k starému knížeti s drahocennou modrou chryzantémou: Jasnosti, tohleto roste tady někde v okolí; pojd'te to hledat. Starý dal hned zapřahat kočár, a že vezmeme Kláru s sebou. Ale Klára se zatím ztratila a nebyla k nalezení.

Ni staris ĉe la veturilo kaj insultis proksimume horetan - li, sinjoro princo, estis iam ĉe dragonoj. Ankoraŭ ni ne estis finintaj kun tio, kiam alkuregis Klára kun elšovita lango kaj puŝis al mi tutan bukedon de freŝe ŝirplukitaj bluaj krizantemoj. La princo donis al ŝi centkronon, sed Klára pro senreviĝo ekploraĉis; povrulino, neniam ŝi vidis centkronon. Mi devis doni al ŝi kronon, por ŝin kontentigi. Ŝi komencis danci kaj krii, sed ni sidigis ŝin sur koĉerbenko, montris al la bluaj krizantemoj kaj, Klára, konduku nin! Klára sur koĉerbenko ĝojkriis; vi ne povas imagi, kiel Lia Moŝto sinjoro koĉero estis indignita, ke li devas sidi ĉe ŝi. Krome ĉevaloj ĉiumomente timiĝis pro ŝia kvivitado kaj kokerikado, nu, ĝi estis satana veturo. Kiam ni veturis jam horon kaj duonon, mi diras: "Ekscelenco, ni faris jam almenaŭ dek kvar kilometrojn."

"Egale," murmuris la princo, "eĉ cent kilometrojn."

"Nu bone," mi rediris, "sed Klára revenis kun la dua buketo post unu horo. Tiu loko ne povas do esti de Lubenec pli malproksime ol tri kilometrojn." "Klára," krias la princo kaj montras al la bluaj krizantemoj, "kie ĝi kreskas? Kie vi trovis tion?" Klára ekgrakis kaj montris konstante antaŭen. Versimile ŝi ĝojis pro veturo en kaleŝo. Aŭdu, mi opiniis, ke la princo ŝin mortigos; Sinjoro Kristo, kiel li sciis furiozi! Desur ĉevaloj ŝaŭmo gutis, Klára gakis, la princo blasfemis, la koĉero mire, ke li ne ploraĉis pro honto kaj mi planis, kiel elserĉi la bluan krizantemon. "Ekscelenco," mi diras, "tiel ĝi ne eblas. Ni devas serĉi sen Klára. Sur mapo ni faros per cirkelo trikilometran rondon, dividos ĝin je sektoroj kaj serĉos de domo al domo."

"Homo," diris la princo, "ĝis tri kilometroj de Lubenec ne ekzistas ja iu parko!"

"Estas bone," mi diras. "En parko vi trovos maljunan diablon; sole se vi serĉus ageraton aŭ kanaon. Rigardu, jen malsupre sur la tigo estas ereto da tero; ĝi ne estas humo, ĝi estas ŝmirmola flavargilo, plej versimile sterkata de homa umaĵo."

Stáli jsme u vozu a nadávali tak dobrou hodinku – on kníže pán býval dřív u dragounů. Ale ještě jsme s tím nebyli hotovi, když se přihnala Klára s vyplazeným jazykem a cpala mně celou kyticí čerstvě narvaných modrých chryzantém. Kníže jí podával stokorunu, ale Klára se dala zklamáním do breku; chudák nikdy stokorunu neviděla. Musel jsem jí dát korunu, abych ji upokojil. Začala tancovat a křičet, ale my ji posadili na kozlík, ukázali na ty modré hryzantémy, a Kláro, veď nás! Klára na kozlíku výskala radostí; to si nemůžete představit, jak byl Jeho Důstojnost pan kočí pohoršen, že musí sedět vedle ní. Kromě toho se koně každou minutu splášili z toho jejího kvikotu a kokrhání, inu, byla to čerchmantská jízda. Když jsme jeli půldruhé hodiny, povídám: „Jasnosti, to už jsme udělali aspoň čtrnáct kilometrů.“

„To je jedno“, bručel kníže, „třeba sto kilometrů.“

„No dobrá,“ já na to, „ale Klára se s tou druhou kyticí vrátila za hodinu. To místo nemůže tedy být dál než tři kilometry od Lubence.“ „Kláro“, křičí kníže a ukazuje na ty modré chryzantémy, „kde to roste? Kdes tohle našla?“ Klára se rozkrákorala a ukazovala pořád dopředu. Nejspíš byla ráda, že jede v kočáře. Poslouchejte, já myslel, že ji kníže zabije; kristepane, ten se uměl vztekat! Z koní kapala pěna, Klára kejhalala, kníže se rouhal, kočí div nebrečel hanbou a já jsem dělal plány, jak vypátrat modrou chryzantému. „Jasnosti“, povídám, „takhle to nepůjde. Musíme hledat bez Kláry. Uděláme si na mapě kružítkem okruh tří kilometrů, rozdělíme to na úseky a budeme hledat dům od domu.“

„Člověče“, řekl kníže, „na tři kilometry od Lubence není přece žádný park!“

„To je dobře,“ povídám. „V parku byste našel starého čerta; ledaže byste hledal ageratum nebo kanu. Koukejte se, tadyhle dole na stonku je drobet půdy; to není žádný humus, to je mazlavá žlutka, nejspíš hnojená lidským tentononc.“

Ni devas serĉi lokon, kie estas multe da kolomboj; sur foliaro vi havas multe da kolomba fekaĵo. Versimile ĝi kreskas ĉe barilo el ne senkrustigitaj stangoj, ĉar tie en foli-akselo estas peceto da forfalinta picea krusto. Tio estas do preciza gvidilo." "Kia?" diras la princo. "Nu tia," mi diras, "ke ni devas ĝin serĉi ĉe ĉiu etbieno en trikilometra sfero; ni dividus nin je kvar grupoj: vi, mi, via ĝardenisto kaj mia helpanto Vencl, kaj prete."

Bone, tuj matene la unua afero estis, ke Klára denove alportis al mi bukedon de bluaj krizantemoj. Poste mi traserĉis mian sektoron, en ĉiu gastejo mi trinkis varman bieron, manĝis fromaĝetojn kaj demandis homojn pri la bluaj krizantemoj. Sinjoro, ne demandu, kian lakson mi havis post la fromaĝetoj; varmo estis, kia montriĝas iam fine de septembro, kaj mi eniris ĉiun kabanon kaj devis toleri ian ajn brutalaĵon, ĉar oni opiniis, ke mi estas frenezulo, agento aŭ iu el oficio. Sed vespere unu afero estis certa: neniuj bluaj krizantemoj kreskis en mia sektoro.

En la ceteraj tri oni trovis ankaŭ nenion. Nur Klára alportis novan bukedon de plukitaj bluaj krizantemoj. Sciu, tia princo estas granda sinjoro, se oni ĉion prikonsideras; li venigis do ĝendarmojn, al ĉiu enmanigis unu floron de blua krizantemo kaj promesis al ili mi ne scias kion, se ili trovos, kie ĝi kreskas. Ĝendarmoj, sinjoro, estas kleraj homoj, legas ĵurnalojn kaj alion; krome ili konas ĉiun ŝtonon kaj havas egan influon. Sinjoro, prikonsideru, tiutage ses ĝendarmoj, komunumaj policistoj, vilaĝestroj, lerneja junularo kun instruistoj kaj unu cigana bando trampis la tutan terenon en sfero de tri kilometroj, plukis ĉion, kio ie floris kaj alportis en la kastelon.

Jesuokristo, da ĝi estis tiom, kiom dum Kristkorpa Festo; sed la blua krizantemo, memkomprene, eĉ ne unu. Kláran ni submetis al la tuttaga gardado; nokte ŝi fuĝis kaj post noktomezo ŝi alportis al mi plenbrakon de bluaj krizantemoj.

Tuj ni enkarcerigis ŝin, por ke ŝi ne ŝirpluku ĉiujn; sed ni estis senkonsilaj.

Musíme hledat místo, kde je hodně holubů; na lupení máte plno holubího trusu. Nejspíš to roste u plotu z neloupaných tyček, protože tuhle je v paždí listu ždíbec odprýsknuté smrkové kůry. Tak, to je přesné vodítko.“ „Jaké?“ povídá kníže. „No, takové,“ já řku, „že to musíme hledat u každé chalupy v okruhu tří kilometrů; rozdělíme se na čtyři skupiny: vy, já, váš zahradník a můj pomocník Vencl, a je to.“

Dobrá, ráno nato byla první věc, že mi Klára zase přinesla pugét modrých chryzantém. Potom jsem propátral svůj úsek, v každé hospodě jsem pil teplé pivo, jedl syrečky a ptal se lidí po modrých chryzantémách. Pane, neptejte se, jaký průjem jsem měl po těch syrečkách; horko bylo, jako se někdy koncem září vydaří, a já vlezl do každé chalupy a musel si nechat líbit ledajaké hrubství, protože lidé si mysleli, že jsem blázen, agent nebo někdo od úřadu. Ale jedna věc byla večer jistá: žádná modrá chryzantéma v mém úseku nerostla.

V ostatních třech nenašli taky nic. Jen Klára přinesla novou kytici nalámaných modrých chryzantém. To víte, takový kníže je velký pán, když se to vezme kolem a kolem; tak on si zavolal četníky, každému dal do ruky jeden květ modré chryzantémy a slíbil jim nevimco, když mu najdou, kde to roste. Četníci, pane, to jsou vzdělaní lidé, čtou noviny a tak; krom toho znají každý kámen a mají náramný vliv. Pane, považte si, že toho dne šest četníků, obecní strážníci, starostové obcí, školní mládež s učiteli a jedna tlupa cikánů prolézali celý ten kousek země v okruhu tří kilometrů, otrhali všechno, co kde kvetlo, a donesli to do zámku. Prokrindapána, to vám toho bylo, jako o Božím těle; ale modrá chryzantéma, to se ví, ani jedna. Kláru jsme dali po celý den hlídat; v noci utekla a po půlnoci mi přinesla plnou náruč modrých chryzantém. Dali jsme ji hned zavřít do šatlavy, aby neotrhala všechny; ale byli jsme v koncích.

Je mia animo, kvazaŭ en magia rondo; imagu, regiono kiel manplato – Aŭdu, oni rajtas esti vulgara, kiam oni troviĝas en granda mizero aŭ kiam oni renkontiĝas kun malsukceso; tion mi scias; sed kiam sinjoro princo pro kolerego diris al mi, ke mi estas la sama idioto kiel Klára, mi rediris al li, ke de tia olda kreteno mi ne toleras insulton, kaj iris direkte al trajno; de tiu tempo mi ne estis en Lubenec. Sed kiam mi sidis jam en vagono kaj la trajno ekveturis, sinjoro, mi ekploraĉis kiel eta bubo, ke neniam plu mi ekvidos la bluan krizantemon kaj ke mi ĝin por ĉiam forlasas.

Kaj dum mi ploraĉas kaj rigardas el fenestro, mi vidas tuj ĉe trako ion bluan. Sinjoro Ĉapek, ĝi estis pli forta ol mi: ĝi elĵetis min desur la sidloko kaj ektiris alarmbremson - pri tio mi eĉ ne sciis; la trajno skue ekhaltis, kiel oni bremsis, kaj mi falis sur kontraŭan sidlokon - ĉe tio rompiĝis ĉi tiu fingro. Kaj kiam alkuris konduktoro, mi balbutis, ke mi forgesis ion en Lubenec, kaj devis pagi damnan punpagon. Sinjoro, mi sturne insultis kaj lamis laŭ la trako reen al tio blua. Ci stultulo, mi diris al mi, eble ĝi estas nur aŭtuna astero aŭ alia blua herbaĉo, kaj ci elĵetas tian nekristanan monon! Mi paŝis proksimume kvincent metrojn; jam mi opiniis, ke tio blua ne povis esti tiel malproksime, ke mi preteriris ĝin aŭ ke io nur ŝajnis al mi, kiam sur tia eta digo mi vidas trakgardistan dometon kaj tra stangobarilo de ĝardeneto leviĝas io blua. Tio estis du tufoj de la blua krizantemo.

Sinjoro, ĉiu infano scias, kion tiuj trakgardistoj kulturas en siaj ĝardenetoj. Krom sabeliko kaj melonoj kutime ĝi estas sunfloro, kelkaj ruĝaj rozoj, malvoj, tropeolo kaj dise iu dalio; ĉi tiu ulo eĉ ne tion havis, sed nur terpomojn, fazeolojn, unu sambukon kaj jen en angulo du bluajn krizantemojn.

"Homo," mi diras al li trans la barilon, "kie vi prenis ĉi tiujn bluajn florojn?" "La bluajn?" diris la gardisto. "Jes, ili restis ĉi tie post mortinto Ĉermák, kiu estis trakgardisto antaŭ mi. Sed iro sur la trako estas malpermesita, sinjoro.

Namouduŝi, to bylo jako v začarování; představte si, kraj jako dlaň – Poslouchejte, člověk má právo být sprostý, když je v moc velké bídě nebo když ho potká neúspěch; to já znám; ale když mně kníže pán z toho vzteku řekl, že jsem stejný idiot jako Klára, namítl jsem mu, že si od takového starého kreténa nenechám nadávat, a šel jsem rovnou k vlaku; od té doby jsem v Lubenci nebyl. Ale když už jsem seděl ve vagóně a vlak se hnul, já jsem se, pane, dal do breku jako malý kluk, že už neuvidím modrou chryzantému a že ji nadobro opouštím.

A jak tak brečím a koukám z okna, vidím hnedle u trati něco modrého. Pane Ĉapek, to bylo silnější než já: vyhodilo mne to ze sedadla a zatahalo to za poplašnou brzdu – já o tom ani nevěděl; vlakem to drclo, jak brzdili, a já jsem se svalil na protější sedadlo – přitom jsem si zlomil tenhle prst. A když přiběhl konduktér, koktal jsem, že jsem něco v Lubenci zapomněl, a musel jsem zaplatit zatracenou pokutu. Pane, já jsem nadával jako špaček a kulhal jsem po trati zpátky k tomu modrému. Ty troubo, říkal jsem si, třeba to je jenom trs podzimních aster nebo jiný modrý neřád, a ty vyhodíš takové nekřesťanské peníze! Ušel jsem asi pět set metrů; už jsem myslel, že to modré nemohlo být tak daleko, že jsem to minul nebo že se mi to jenom zdálo, když na takovém malém náspu vidím vechtrovský domek a přes tyčkový plot jeho zahrádky kouká to modré. Byly to dva trsy modré chryzantémy.

Pane, každé dítě ví, co tihle vechtří pěstují na svých zahrádkách. Krom kapusty a melounů je to obyčejně slunečnice, pár červených růží, malvy, tropaeolum a nějaká ta jirina; tady ten chlapík neměl ani to, ale jenom brambory, fazole, jeden černý bez a tady v koutě ty dvě modré chryzantémy.

„Člověče,“ povídám mu přes plot, „kde jste vzal tyhle kytky?“ „Ty modrý?“ řekl hlídač. „Jo, ty tu zůstaly po nebožtíkovi Čermákovi, co tu byl vechtrem přede mnou. Ale tady po trati se nesmí chodit, pane.

Tie estas tabuleto: Irado sur la trako estas malpermesita. Kion vi faras ĉi tie?"

"Oĉjo," mi diras al li, "kaj mi petas vin, tra kie oni iras al vi?"

"Laŭ la trako," postdiras la gardisto. "Sed ĉi tien neniu envenu. Kion vi volas ĉi tie? Foriĝu, danma stultulo, sed sur la trakon vi darfus eĉ ne per piedo!"

"Do tra kie," mi diras, "mi foriĝu?" "Egale al mi," krias la gardisto, "sed surtrake ne, kaj sufiĉe."

Mi sidiĝas do sur trakrando kaj diras: "Aŭskultu, oldulo, vendu al mi la bluajn florojn." "Mi ne vendos," murmuris la trakgardisto. "Kaj paku vin for. Ĉi tie oni ne darfus sidi!"

„Kial ne," mi diras al li. "Sur neniu tabuleto estas skribite, ke ĉi tie oni ne darfus sidi. Iri ĉi tie oni ne darfus, kaj mi do ne iras." La gardisto embarasiĝis kaj limiĝis al tio, ke li insultis min trans la barilon. Sed versimile li estis solulo; post tempeto li ĉesis insulti kaj parolis al si mem. Post duonhoro li eliris por inspekti la trakon.

"Nu, kio," li haltis ĉe mi, "ĉu vi foriros de ĉi tie aŭ ne?"

"Mi ne povas," mi diras, "iri sur la trako estas malpermesite, kaj alia vojo ne kondukas de ĉi tie." La gardisto momenton pripensis. "Sciu do," li diris poste, "kiam mi malaperos post la vojeto tie, perdiĝu de ĉi tie laŭ la trako; mi ne vidos tion." Arde mi dankis al li, kaj kiam li malaperis post la vojeto, mi transrampis la barilon de lia ĝardeneto kaj per lia propra ŝpato mi elfosis ambaŭ bluajn krizantemojn. Mi ŝtelis ilin, sinjoro. Mi estas honesta ulo kaj en mia vivo mi ŝtelis nur sepfoje; kaj ĉiam tio estis floroj.

Post horeto mi sidis en trajno kaj veturigis hejmen la ŝtelitajn bluajn krizantemojn. Kiam mi preterveturis la gardistdomon, staris tie la trakgardisto kun flageto kaj mienaĉis kiel diablo. Mi svingis al li per ĉapelo, sed mi opinias, ke li ne ekkonis min.

Vidu do, sinjoro: ĉar tie estis tabuleto kun surskribo "Malpermesita vojo", neniu, nek ni, nek ĝendarmoj, nek infanoj havis ideon, ke iu povus tie iri serĉi la bluajn krizantemojn.

Tamhle je tabulka ‚Po trati choditi se zapovídá‘. Co tu máte co dělat?"

„Strejčku," povídám mu, „a prosím vás, kudy se k vám chodí?"

„Po trati," na to hlídač. „Ale sem nemá nikdo co chodit. Co tu chcete? Klid'ťe se, ztracenej trumbero, ale na trať nesmíte ani nohou!"

„Tak kudy," já řku, „se mám klidit?" „To mně je jedno," křičí hlídač, „ale po trati ne, a basta!"

Sednu si tedy na ten břeh a povídám: „Poslouchejte, dědo, prodejte mi ty modré kytky." „Neprodám," bručí vechtr. „A pakujte se vocaď. Tady se nesmí sedět!"

„Pročpak ne," říkám mu. „To není napsáno na žádné tabulce, že se tu nesmí sedět. Chodit se tu nesmí, a já teda nechodím." Hlídač se zarazil a obmezil se na to, že mně nadával přes plot. Ale byl to nejspíš samotář; za chvíli přestal nadávat a mluvil sám se sebou. Za půl hodiny vyšel, aby obhlédl trať.

„Tak co," zastavil se u mne, „pudete vocaď, nebo ne?"

„Nemůžu," povídám, „po trati chodit je zakázáno a jiná cesta odtud nevede." Hlídač chvíli přemýšlel. „Tak víte co," řekl potom, „až tamhle zajdu za ten pešunk, ztrat'ťe se odtud po trati; já to nebudu vidět." Vřele jsem mu poděkoval, a když zašel za ten pešunk, přešel jsem přes plot do jeho zahrádky a jeho vlastním rýčem jsem vyryl obě ty modré chryzantémy. Já jsem je ukradl, pane. Jsem poctivý chlap a kradl jsem v životě jenom sedmkrát; a vždycky to byly kytky.

Za hodinku jsem seděl ve vlaku a vezl si domů ukradené modré chryzantémy. Když jsem jel podle toho strážního domku, stál tam ten vechtr s praporečkem a škaredil se jako čert. Mával jsem na něj kloboukem, ale myslím, že mě nepoznal.

Tak to vidíte, pane: že tam byla tabulka s nápisem „Zakázaná cesta," nikoho, ani nás, ani četníky, ani cikány, ani děti nenapadlo, že by tam někdo mohl jít hledat modré chryzantémy.

Tian forton, sinjoro, havas la averta tabuleto. Eble, ke ĉe gardistdometoj floras bluaj primoloj aŭ arbo de scio aŭ ora filiko, sed neniu ilin iam malkovros, ĉar surtrake iradi estas severe malpermesite kaj fino. Nur la frenezeta Klára tien envenis, ĉar ŝi estis idioto kaj ne sciis legi. Tial mi donis al la korimboporta krizantemo nomon Klára. Kun ĝi mi filigranas jam dek kvin jarojn. Sed versimile mi ĝin trosentemigis per bona humo kaj malsekeco - tiu vulgarulo trakgardisto ĝin tute ne akvumis, ĝi havis tie argilon kiel stanon; mallonge, printempe ĝi ekĝermas, en somero atakas ĝin ergoto kaj en aŭgusto ĝi pereas. Konsideru, mi sola en la mondo havas la bluan krizantemon kaj ne povas kun ĝi antaŭ la publikon. Ja, Bretonio kaj Anastazia, ili estas nur liletaj; sed Klára, sinjoro, kiam foje Klára floras al mi, tiam parolos pri ĝi la tuta mondo."

Takovou sílu, pane, má výstražná tabulka. Možná, že u vechtrovských domků rostou modré petrklíče nebo strom poznání nebo zlaté kapradí, ale nikdo je nikdy neobjeví, protože po trati choditi se přísně zapovídá a basta. Jenom bláznivá Klára se tam dostala, protože byla idiot a neuměla číst. Proto jsem dal modré pompónce chryzantémě jméno Klára. Už se s ní párám patnáct let. Ale nejspíš jsem ji zchoulostivil dobrou půdou a vláhou – ten krobián vechtr ji vůbec nezaléval, měla tam jíl jako cín; zkrátka zjara mně vyrazí, v létě dostane padlí a v srpnu zachází. Považte si, já jediný na světě mám modrou chryzantému, a nemohu s ní na veřejnost. Kdepak Bretagne a Anastázie, ty jsou jen trochu do lila; ale Klára, pane, až mně jednou pokvete Klára, tak o ní bude mluvit celý svět."